

# La NASKa Fasko

Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe UT-Dalaso

ĵaŭdon, la 28-an de junio, 2012 • numero tri

## Hodiaŭaj eventoj


★ 8:45 atm – 12:15 ptm:  
Kursoj

★ 12:15 – 1:00 ptm:  
Tagmanĝo

★ 3:00 – 3:45 ptm: **Prezento**  
Gary ANDERSON prezentos pri siaj spertoj instrui Esperanton ĉe la lernejo Seattle Academy

★ 5 – 6:30 ptm: **Vespermanĝo**

★ 7:30 – ??? ptm: **Eventoj en la gufujo**  
Unue Filipino DORCAS gvidos diskuton pri la defioj kiuj alfrontas multajn lokajn Esperanto-grupojn. Restu poste por babili, frandi teon kaj kleriĝi.



## Veterprognozo

De Filipino DORCAS

Varmos hodiaŭ. Kiel varme estos? Tiel varme, ke...

... kokinoj demetos frititajn ovojn.

... terpomoj memkuiro subtere.

(Simple elprenu ilin kaj aldonu buteron, salon, kaj pipron.)

... varma akvo venos el ambaŭ kranioj.

... eĉ la suno serĉos ombron.

... hundoj ĉasos katojn, kaj ambaŭ promenos.

### La NASKa Fasko

Redaktejo: Ĉambro 4.418  
<nask.esperanto@gmail.com>

La NASKa Fasko estas ĉiutaga informbulteno de la kursaro. Trovu ĝin matene sub via pordo aŭ en la "gufujo" en la 4-a etaĝo.

Se vi volas kontribui mallongan artikolon, foton, ŝercon, bildstrion, leteron, poemon, am-leteron, ktp. bonvolu alporti ĝin al la redaktejo en ĉambro 4.418, aŭ – eĉ pli bone – sendu ĝin al <nask.esperanto@gmail.com>.

## Kokovojo

de Ray REDD

*Kial la koko transiris la vojon?*

*Jen diversaj respondoj.*

• **Isako NEŬTONO:** Senmovaj kokoj emas resti senmovaj. Moviĝantaj kokoj emas transiri la vojon.

• **Timothy LEARY:** Ĉar tio estis la ununura veturo kiun la establaĵo permesis ĝin fari.

• **Platono:** La ideala koko devas ideale transiri la idealan vojon. Sed en tiu ĉi mondo, malperfektaj kokoj transiras malperfektajn vojojn, malperfekte.

• **Aristotelo:** Estas en la naturo de kokoj, transiri la vojon.

• **Karlo MARKSO:** La transiro de koko estis historia neevitebleco.

• **Kapitano James T. KIRK:** Por iri tien, kien neniu koko iris antaŭe.

• **La usona spionagejo CIA:** Pro kialoj de nacia sekureco, ni nek konfirmas, nek neas la ekziston de aŭ la koko aŭ la vojo.

• **Oscar WILDE:** La problemo de la koko havas multajn profundaĵojn, kaj ĉiuj el ili estas egale malprofundaj.

• **D-ro Seuss:**

*Ĉu la kok' transvojen iris?*

*Ĉu la kok' ĉareton tiris?*

*Jes, la kok' transvojen iris.*

*Sed kial? Neniu diris.*

• **Budho:** Fari tiun demandon neas vian propran kokan econ.

• **Albert EINSTEIN:** Ĉu la koko transiris la vojon aŭ ĉu la vojo pasis sub la koko dependas de la referenckadro de la vidanto.

• **Charles DARWIN:** La transiro de la koko estis la sekva paŝo post la supreniro de la arboj.

• **Thomas JEFFERSON:** Ĉiujn kokojn dotis Naturo kaj la Dio de Naturo per la rajtoj de vivo, libereco, kaj strebado atingi la alian flankon.

• **Martin Luther KING, Jr.:** Mi revas pri tempo, kiam ĉiuj kokoj povos transiri ĉiujn vojojn, kaj neniu demandas pri iliaj kialoj.

• **Jean-Paul SARTRE:** Por trudi sencon al sia akcidenta ekzisto.

• **Ernest HEMINGWAY:** Por morti. En la pluvo.

• **Ronald REAGAN:** Mi forgesis.

• **Iu sennoma teksasano:** Por montri al la dazipo, ke tio eblas. (Kial la dazipo transiris la vojon? La dazipo ne transiris la vojon.)

• **L. L. ZAMENHOF:** Por paroli kun la kokoj de la mondo, per la Internacia Lingvo.

• **Eŭgeno LANTI:** Por partopreni la tutmondan klasbatalon.

• **Renato CORSETTI:** La koko transiris la vojon, aŭ eĉ la vojegon. Sed diri ke la koko transiris la ŝoseon estas ĝena francismo.

• **Kolenelo Harland SANDERS:** Ĉu mi preteratentis kokon?

## Ŝerco

Piloto aviadis super Afriko. Li alvokis surteran direktiston per radio, demandante, "Kioma horo estas?"

La direktisto respondis, "El kiu lando vi estas?"

"Ĉu gravas?" demandis la piloto.

"Ho, jes", la direktisto diris, "Se vi estas el Svislando, estas la naŭa kaj dek du minutoj kaj kvindek du sekundoj. Se vi estas brita, estas ĝuste la naŭa. Se vi estas el Niĝerio, estas pli malpli julio..." (dankon al Taylor FRANCIS)

# La nekonata historio de la nomo *Dalaso*

de Hoss FIROOZNIJA

Estas apenaŭ kredeble, sed kie ajn NASK okazas, preskaŭ ĉiam ni trovas nin en loko nomita fare de pra-esperantistoj.

Ekzemple: de 2006 ĝis 2011 la sidejo de NASK estis *San-diego*, urbo kies nomo venas el la nebula pratempo, kiam sunadorantaj indiĝenoj de suda Kalifornio preĝis al sia grandega “sun-diego”. (Dum la intervenaj jarmiloj, *sun* kompreneble evoluis al *san* pro natura ŝanĝiĝo de vokaloj.)


Eĉ la nomo *Kalifornio* havas Esperantan fonton (*NASKa Fasko*, n-ro 2008:2). Ĝi venas el epoko kiam la indiĝena popolo *Kalli* bakis siajn venkitajn malamikojn en fornoj por fari el ili bongustajn homtortojn. Unue, timigitaj najbaroj parolis pri lando de la teruraj “*Kalli-fornoj*”. Kaj per lingva evoluo, la nomo finfine fariĝis *Kalifornio*.

Estas do iusence tute nesurprize, ke ankaŭ ĉi-jare nia gastiga urbo havas nomon kun Esperanta historio. (Espereble ĝi aparte interesos niajn lernantojn el foraj mondopartoj, kiuj neniam antaŭe havis okazon viziti Teksason.) Efektive, historiistoj multe disputis pri la deveno de la nomo *Dalaso*, kaj dum multaj jaroj la origino restis mistera. Sed danke al esploroj de diligentaj esperantistoj, la vero estas nun konata:

La nomo venas al ni el la vakera kulturo de la 19-a jarcento. En tiu sovaĝa pratempo, la teritorion de Teksaso setlis ĉefe brutbredistoj, kiuj paŝtis bovojn (kaj ankaŭ multe pli sovaĝajn bestojn) en grandaj ranĉoj sur la vasta, ebena prerio.

Por plej efike regi siajn gregojn, la vakeroj utiligis *lazojn* – fortajn ŝnurojn kun grandaj maŝoj, kiujn oni ĵetas ĉirkaŭ la kolojn de brutoj por kapti ilin. Lazado estas arto tre malfacile lernebla, kaj por mastri ĝin, oni devas trejniĝi konstante. Rezulte, la lazoj de vakeroj rapide eluziĝis kaj rompiĝis, tiel kreante profitdonan komercon por entreprenaj lazovendistoj.

En la nordorienta parto de la teksasa teritorio situis rimarkinda urbo kun multaj vaste konataj lazovendistoj. Ili tiel famis pro la kvalito de siaj lazoj, ke vakeroj kutimis vojaĝi tien de multaj mejloj por marĉandi en grandaj lazobazaroj. Ĉiutage, aŭdiĝis tra la urbo la raŭkaj krioj de la lazovendistoj: “He, vakero! Kiom da lazo vi volas? Kiom da lazo?!”



Pra-dalasano lazas sovaĝan ĝirafon sur la teksasa prerio

La urbo fariĝis tiel bone konata pro la komerco kaj krioj de lazovendistoj, ke homoj tra Teksaso nomis ĝin *Da Lazo*. Nun, post jaroj de fonema evoluo, en epoko kiam jam malaperis kaj la vakeroj kaj memoro pri la lazovendado, la urbo simple nomiĝas *Dalaso*.

Esperanto-historiistoj nun esploras la nomon *Teksaso*, kiu ŝajne venis el la vigla kartluda kulturo ĉi tie. (Pensu ekzemple pri la mondfama speco de pokero *Texas Hold*

*Em.*) Kiel ni mem eksciis dum la lastaj kelkaj tagoj, Teksaso estas lando brule suna, kun relative malmultaj arboj. En la 19-a jarcento, sen rapida transporto por varoj, tiu arbomanko multe altigis la koston de papero – kaj kartoj. Malriĉuloj devis elpensi aliajn manierojn fari ludkartojn... ekzemple, el teksita lano. Historiistoj forte suspektas, ke la teritorio famis pro ĝuste tiaj “tekskartoj”, precipe la teksitaj asoj, aŭ *teksasoj*... Necesas plua esploro, tamen.

## Aviadaj diraĵoj

de Kelly NETTERVILLE

Inter helikopteraĵoj kaj pilotoj de fiksflugilaj aviadiloj estas malgranda, amika rivalado.

Ekzemple, helikopteraĵoj ofte diras, “Kurejoj estas por vantuloj.” Tiu frazo spegulas la senton inter helikopteraĵoj kaj fiksflugilaj aviadiloj ricevas iomete tro multan atenton. Malgraŭ ĉio, helikoptero

kapablas facile alteriĝi en multaj lokoj kie fiksflugila aviadilo neniam eĉ provas.

Kompreneble, la fiksflugilaj pilotoj havas siajn proprajn aforismojn. Unu estas, “Helikopteroj ne povas flugi. Ili estas nur tiel bruegaj kaj skuegaj, ke la tero malakceptas ilin.”

Tamen, mia tre ŝatata diraĵo ambaŭflanke konvenas: “La piloto kiu diras: ‘Rigardu min!’ ne estas piloto kun kiu oni volas flugi.”